

# REGISTROLIBRO DE LA MONDCIVITANOJ

## Kunveno de la Estraro

La 29an de aprilo 2008 de 15 h ĝis 20 h,  
en la lokalo de Mondcivitana Registrolibro, en Parizo 66 bd Vincent Auriol kunvenis :  
Prezidanto Daniel Durand,  
Vic-prezidantino Geneviève Charpentier,  
Ĝenerala Sekretario Patrice Lovesse

### Tagordo :

- Kadro kaj celoj por la periodo 2008-2010 laŭ dokumento disdonita al la membroj de la Administra Konsilantaro ;
- demandoj prezentitaj de Urbain Kapoko
- propono prezentita de Henri Cainaud (Saĝula Konsilio)
- ekzameno de la kontribuado de la Plenuma Komitato de Kongreso de la Popoloj (dokumento de Heloisa Primavera)
- diversaj punktoj sekve de la Administra Konsilantaro de la 29a de marto.

## PROTOKOLO

### 1. INTERNA REGULARO

- 1.1. Unu parto de la distribuita dokumento « kadro kaj celoj » estos integrita en la Interna Regularo de Mondcivitana Registrolibro. Tiuj dispozicioj, laŭ pli ellaborita formo, estos submetitaj al la Ĝenerala Asembleo de 2010.
- 1.2. Perkoresponda balotado : Tamen sen atendi tiun Ĝeneralan Asembleon, la Estraro decidis, ke la Administra Konsilantaro povos valide labori per korespondado : decidoj povos esti faritaj per voĉdono laŭ absoluta plimulto de la membroj de la Administra Konsilantaro. (t.e. nun 16 voĉoj el 31 membroj)
- 1.3. La « *Direktivoj koncernantaj la funkciadon de Registrocentro* » estas ĝisdatigitaj por integri la modifon de la fakturado de la legitimkartoj.

### 2. INFORMADO KAJ KLERIGO

2.1. « *Ĉiuj ni estas* » : la paĝo 4 de la dokumento « *Ĉiuj ni estas Mondcivitanoj* » estas rearanĝita per integrado de tiuj tri modifoj :

- la tutmondigoj de la komunumoj fariĝas unu el la agadaj fakoj de Mondcivitana Registrolibro ;
- La Kongreso de la Popoloj estas prezentita kiel rezulto de la kunveno de Bruselo de 1963, kaj ne plu kiel institucio de la nuraj « civitanoj de la mondo » ;
- La informo pri AMIP estas provizore forviŝita ĉar tiu gazetagejo ne plu funkcias de post 1990.

#### 2.2. Klerigo

- à ACCRA (Ganao). Seminario de Tutmondismaj Studoj estas planita por okazi dum la unua duono de oktobro enkadre de ASKOP. La antaŭa buĝeto estas atendata.
- à BUKAVU (Kongio). Pro daŭra nesekureco en la regiono kaj pro problemoj koncernantaj la flughavenoj de Goma kaj Kavumu, la seminario planita por okazi en la kunvenejo Amani en Bukavu estas prokrastita.
- à El intensa korespondado inter Liliane Metz-Krencker kaj Daniel Durand de 2000 ĝis 2003 rezultas arkivoj utilaj por la konsistigo de pedagogia dokumento. Patrice Lovesse sin taskas per la projekto. Daniel Durand transdonos al li la arkivojn sub forme de CD-rom.
- à Esperanto : la postulo estas forta far Registrocentroj kaj Korespondantoj de Registrolibro por eklerni kaj disvastigi Esperanton. Tiu afero transpasas la kompetentecojn de Registrolibro, tamen la estraro faros sian eblon por interrilatigi la interesiĝantojn kun kompetentuloj.

### **3. STRUKTUROJ**

#### **3.1. « Interkontinenta »**

- Leginte la dokumenton titolitan « Ĝeneralaj Strukturoj » lokitaj en Interreton ekde 2006 ([www.recim.org/cdm/structure-eo.htm](http://www.recim.org/cdm/structure-eo.htm)) ;

- Leginte la proponojn faritajn de Henri Caignaud je la nomo de la Saĝula Konsilantaro, por laŭkontinenta strukturado de Registrolibro ;

la estraro konstatas la principan koherecon inter la dokumento kaj la ĉi supraj proponoj. Unua eksperimento povos okazi en Afriko. Vidu 3.2.

La plivastigo de la eksperimento estas kompreneble ligita kun la dispono de motivigitaj kaj kapablaj homoj.

#### **3.2. RACECIM**

Sekve de la rekomendoj de la Seminario de Tutmondismaj Studoj en Bohicon en oktobro 2006, Patrice Lovesse iniciatis lanĉi la Afrikan reton de la Registrocentroj de la Mondcivitanoj » (RACECIM laŭ la franca mallongigo). Statuto<sup>1</sup> estas metita en Benino kaj Togolando. Ĝi estos ankaŭ enregistrita en Ganao, poste proponita en la aliaj afrikaj landoj kie ekzistas Registrocentroj.

Patrice Lovesse proponas, ke estos organizita en Burkinio kunveno de la responsantoj de la enregistrado (Korespondantoj de Registrolibro kaj responsantoj de Registrocentroj) por la tuta Okcidenta Afriko.

### **4. NOVAJ TEKNIKOJ**

#### **4.1. Telematikaj enregistraĵoj.**

La celo estas ebligi aŭtomatan enregistradon en granda nombro de la civitanoj de la mondo. La laboro komencita de Thibault Carrier bedaŭrinde ne estas finita kaj konsekvence la rezulto de lia laboro ne estas kontentige funkcianta. Tiu punkto estas taksita kiel « unuavica » de la estraro :

- a) trovi Thibault Carrier por la fino de la laboro aŭ transdono de kompetenco en rilatoj kun Thierry Botétéme kaj Florence Cusson ;
- b) revizii la kondiĉaron de la aranĝo de la nova ttt-ejo laŭ la kontribuado de Cyril Bicheron ;
- c) havigi la rezultatojn de la esploradoj farotaj de Heloisa Primavera en ties universitataj medioj ;
- d) lanĉi alvokon al ĉiuj mond-civitanoj por havigi al ni la kompletigan necesan helpon.

#### **4.2. Novaj kartoj**

Laŭ la rezultoj de la esploradoj faritaj de Heloisa Primavera la estraro rilatigas la decidoproceson por la aranĝo de novaj kartoj : plastigeblaj kartonoj ? plastaj kartoj ? Tiuj novaj kartoj ebligis eldonadon en novaj lingvoj laŭ plej malalta kosto.

4.3. Telematikaj balotadoj – civitaneca klakado : vidu en la kondiĉaro.

### **5. STRATEGIO KAJ POLITIKO**

La aferoj pri strategio kaj politiko nun dependas el la kompetenteco de la Kongreso de la Popoloj. Tamen Mondcivitana Registrolibro plu zorgos :

- o la rilatojn kun UNESKO ;
- o agadon ĉe ĉiuj organizaĵoj kaj strukturoj kiuj partoprenas en la vekado al monda civitaneco kaj al monda demokratio, tio en la nura celo konsistigi la estontajn mondajn listojn de voĉdonantoj.

*Fino de la kunveno je 20 h*

---

<sup>1</sup> Diskuto okazis inter Patrice Lovesse kaj Daniel Durand pri la kunmetado de la terminoj « reto » kaj « statuto ». Fakte, laŭ eŭropa koncepto, reto enhavas neformalan naturon dum tre ofte en Afriko reto povas ekzisti nur se ĝi estas strukturita, manke de kio ĝi ne havas agadliberon. Ĝi do estas ia arigo kun federacia karaktero (noto de DD)